

Leterkesto, 3-a parto
Claude Gacond, 370-a radioprelego, 1970.11.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Trian fojon ni malfermas nian leterkeston por babladi kun niaj radio-geaŭdantoj. Dum la pasintaj monatoj nin salutis geaŭdantoj el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando, do el 15 landoj eŭropaj.

A.- Ni jam respondis al la leteroj kaj poŝtkartoj el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando kaj Francio. Laŭ la alfabeto vico, kiun ni elektis por tiu bablado, nun alvenas la lando Okcidenta Germanio.

Cl.- Sinjoro Hermann Behrmann, kiu programis esperanto-kurson por germanlingvanoj, anoncas, ke pli ol tri mil personoj jam eklernis esperanton per lia programita kurso. Dum tiu ĉi jaro li rekomencis novan varb-kampanjon sub la titolo **esperanto programita, test 5000**. Li anoncas la baldaŭan eldonon de angla eldono de tiu programita kurso. Ni esperas al tiu nova kurso saman vastskalan sukceson. Ni kuraĝigas la germanlingvajn geaŭdantojn aktive kunlabori al la kampanjo **test 5000**. Por tio ili sendu al sinjoro Hermann Behrmann aŭ al Radio-Svislando la nomojn kaj adresojn de la personoj, kiuj estas favoraj al esperanto. Tiel sinjoro Behrmann povos proponi al ili la unuan lecionon de sia programita kurso. Kaj ni instigas la anglo-parolantojn sin pretigi al vastskala varbkampanjo por la testado de la aperonta programita kurso.

A.- Sinjoro Bruno Gahler en Glinde ne konsentas kun nia sinteno rilate al la sudet-germana afero. Ni legas eron el lia poŝtkarto :

Cl.- « *Estis la 4-a de marto 1919, kiam la sudetgermanoj iris sur la stratojn kaj placojn de sia hejmlando por protesti pace kontraŭ la armita okupo de iliaj urboj kaj regionoj flanke de ĉeĥoj. Ili kredis al la memdecida rajto, proklamita de Wilson. [...] kaj multaj inter ili, viroj, virinoj, kaj eĉ infanoj mortis sub la pafoj de la invadintoj. La mondo silentis. Estis ja nur germanoj, nur laboristoj kaj metiistoj kaj oficistoj, kiuj sendiference de politikaj partioj montris al la mondo la malemon aparteni al sin demokrate kamuflinta nova ŝtato. Ni estis aŭstrianoj kaj volis resti civitanoj de tiu ŝtato. Sed kion signifas rajto de sendependaj homoj kontraŭ armiloj – nenion ! La armiloj gajnis. Ĉu vi jam iam aŭdis pri tio ? Certe ne ! Sed kun suprajeco kaj antaŭjuĝoj vi volis paroli pri 3 milionoj kaj duono de mezeŭropanoj kaj diri, ke ilia lando ne estis ilia lando ! Ĉi tiun problemon oni ne povas priparoli en 10 minutoj, precipe ne se oni de komence emas defendi la invadintan partion. [...]* »

A.- La pasintan semajnon vi povis aŭdi kiel la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio *Starto* transformis nian frazon, **tiu tero, kiun vi repostulas, ne apartenas nur al sudetgermanoj**. Forlasante la vorteton **nur**, ili dirigis al ni : **tiu tero, kiun vi repostulas, ne apartenas al sudetgermanoj**.

Cl.- Vi povis aŭdi, kiel ni kritikis tiun ŝovinismon. Al tiuj ĉeĥaj esperantistoj, kiuj ne kapablas vidi pli alten ol la ĉeĥa popoleco ni diras : **tiu tero, kiun vi konkeris, ne apartenas nur al ĉeĥoj**.

A.- En la familia vivo infanoj devas lerni kunvivadi. Ili devas lerni dividi la privilegiojn kaj respondecojn kun la gefratoj.

Cl.- Bedaŭrinde en la intergenta vivo, en la internacia vivo, plej multaj gentoj vidas nur la proprajn privilegiojn. Ili agas kiel infanetoj, kiuj ne ankoraŭ komprenis, ke la aliaj familianoj ankaŭ havas la rajton je egalaj privilegioj.

Leterkesto, 3-a parto
Claude Gacond, 370-a radioprelego, 1970.11.11 & 14

A.- Kiam la gentoj vidos en la aliaj gentoj amikojn anstataŭ malamikoj, tiam oni povos komenci solvi tiujn ĝis nun nesolveblajn limajn problemojn.

Cl.- La svisa historio tiurilate povas multon instrui. Ĝis 1847 okazis inter la svisaj kantonoj konstantaj militaj konfliktoj, ĉar ĉiu gento vidis en si mem absoluton. Subite okazis vera metamorfozo. La ideo de la egaleco de la diversaj svisaj gentoj venkis super la lokaj ŝovinismoj, kaj la moderna svisa federacio naskiĝis.

A.- Kaj en tiu federacio lernis pace kunvivadi 25 ŝtatoj, kies loĝantoj estas dividitaj inter du religioj kaj kvar lingvoj. De la momento kiam tiuj 25 ŝtatoj akceptis perdi parton de sia absoluta suvereneco profite al la svisa federacio, de tiu momento multaj intergentaj konfliktoj solviĝis.

Cl.- Rigardu la hodiaŭan mondon. Okazas veraj intergentaj buĉadoj pro konkero de landoj, kiuj fakte apartenas al pli ol unu sola gento. Tiuj perfortaj luktoj necese finiĝos per la venko de unu batalanto super la alia. Sed ĉu tio signifas, ke la venkanto pravas kaj ke la venkato malpravas? Tute ne! Ambaŭ kondukis kiel infanoj, kiuj batalas por ludi kun la sama ludilo. Sed kutime alvenas patro, patrino aŭ edukisto, kiu ĉesigas la konflikton kaj instruas al la kverelantoj la kunvivadon. Bedaŭrinde en intergentaj konfliktoj neniu intervenas.

A.- Ni opinias, ke analizo de la gent-psikologio estas gravega. Pro tio ni pretigos por vi unuflanke prelegaron pri la etapoj de la svisa federalismo kaj aliflanke pri la interpopola konduto.

Cl.- Al la sudet-germanoj kiel al la ĉeĥoj ni nur povas diri: ĝis nun vi kondukis kiel infanoj, kiuj ne kapablis kunludi. Pro tio vi nur konis kverelojn. En viaj bataloj momente unu venkis, poste la alia. La venkinto ĉiam volis trudi al la venkito siajn leĝojn. Kiam la aŭstroj regadis, tiam la ĉeĥoj devis silenti kaj suferi. Post la unua mondmilito la ĉeĥoj eksuferigis la germanojn. Sub la hitlera regado la germanoj perforte reŝtelis la ludilon, kaj nun la ĉeĥoj rehavas ĝin. Tiu infaneca lukto povus eterniĝi, sed ĝojige iom post iom multaj germanoj kaj multaj ĉeĥoj ekkomprenas, ke super la germaneco, super la ĉeĥeco ekzistas la homeco.

A.- Ĝis nun ni ankoraŭ tro abstrakte sentas nian apartenon al la homaro. Sed jaron post jaro la unueco de la mondo fariĝas pli kaj pli okulfrapa. Esperanto devus konkretigi tiun unuecon, ĝi devus fariĝi edukilo al mondanismo en la lernejoj. Sed, bedaŭrinde ne ĉiuj esperantistoj celas la interpopolan bonon. Ankoraŭ multaj esperantistoj, pere de la internacia lingvo, provas daŭrigi kaj diskonigi siajn egoismajn luktojn.

Cl.- Edmond Privat prave skribis, en *Interpopola konduto*:

A.- « *La plej grava kulpo de la ŝtataj moralistoj kaj pastraroj estis erara konfuzo inter ununombro kaj multnombro. Ne ekzistas nur unu patrujo, mia patrujo, la patrujo, sed multaj patrujoj, niaj patrujoj, la patrujoj. Tute same en nia lando ne estas nur mi, sed ni.*

Cl.- Tion ni devus konstante mediti.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj aliaj geaŭdantoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

-oOo-